



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 8-a de Oktobro 2018

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Mikaelo Lineckij, Dror Gaon, Asaf Ĥefec, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi. Gasto: Amos Ŝapira

*Protokolo de la antaŭa kunsido (3-a de Septembro 2018) – publikigita en la retejo.*  
<http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201809.pdf>

### 1. UEA kotizŝanĝo (Jehoŝua) - *Prokrastita al la venonta kunsido*

### 2. E-kursoj en Tel-Avivo (Amri)

a) Daŭriganta kurso - Doron povos komenci nur fine de novembro.

La demandoj:

- Nun estas la tempo daŭrigi, sed Doron povos nur post unu kaj duon-monato. Ĉu la lernantoj, kelkaj ili kiuj volis jam en aŭgusto – atendos ĝis la fino de novembro?

- Kiuj venos al la komenca kurso, kiam en aprilo ni promesis al ili lanĉi la kurson en septembro-oktobro?

- Ni devos plenumi la promesojn, liveri la kursojn – sen rezigno pri la harmonia ligo kiu estiĝis inter Doron kaj la lernantoj de la unua kurso.

b) eblaj solvoj:

1. Prokrasti ĝis la fino de novembro, kaj Doron instruos ambaŭ kursojn, daŭrigantojn ĝis januaro, komencantojn inter januaro-junio.

2. Aliaj ekinstruos la daŭrigantan kurson, kaj Doron komencos la komencantan kurson fine de novembro.

3. Doron instruos la daŭrigan kurson ekde la fino de novembro, ĝis tiam kelkaj el ni donos kelkajn lecionojn al ili, ke la temprompo ne estu tro longa (Amri: 2, Amir: 2, Mikaelo: paroligaj lecionoj). Entute temas pri 6 semajnoj.

4. Por la komencanta kurso ni devos trovi alian solvon:

- Antaŭ ĉio ni devas telefone informi ĉiujn, ke la kurso povos komenci nur en marto-aprilo.

- Eble post la fino de la unua kurso Doron fartos pli bone, kaj akceptos komenci novan kurson.

- Se ne – eble kelkaj el ni povos organiziĝi, kaj instrui la kurson alternative.

- Eble Mikaelo povos instrui komencantan kurson, kiu komencu fine de januaro (post la daŭriga kurso de Doron)

- Se nenio el la supraj povos realiĝi, - ni devos rezigni pri frontalaj lecionoj, kaj direkti la interesiĝantojn al retaj kursoj.

*[Intertempe parto de la diskuto ĉi-supre malaktualiĝis, ĉar Doron, reveninte de sia foresto, skribis ke li tamen pretos instrui la komencantan kurson post la daŭriga kurso]*

c) Aliaj temoj pri la komencanta kurso: reklamado? kotizo? daŭro?



ĉ. Kompenco de Doron: Stipendio de 3500 en 2019 (rilate al la daŭriga kurso) laŭ buŝa interkonsento, kaj se estos plia agado (ekz. komencanta kurso) – ĝis la sumo de 10,000 s.

### 3. Dratverejo (Gabi, Jehoŝua)

a) Rajtigilo al Jehoŝua kaj/aŭ Amri subskribi la kontrakton pri evakuo-rekonstruo (פינוי בינוי) ĉe la advokato S-ro Josi Omid. *Decido: Akceptite unuanime.*

b) Jam 3 monatojn ELI, eĉ helpe de la makleristino, ne sukcesis trovi klienton.

c) Reklamado en Yad2: hodiaŭ Gabi metis reklamon en Yad2 kaj jam ricevis ses telefonvokojn. Ili estis direktitaj al Amos, kiu ordigos iliajn vizitojn laŭ siaj eblecoj.

ĉ) Gabi estos enlande nur dum dek tagoj. Poste respondos Amos Ŝapira. Li petas rekompenson pri siaj elspezoj, veturoj, tempo.

d) Transdono de la kontoj en la urbestrejo – aranĝita inter Amos kaj Ŝlomo.

e) Plibonigo cele al evakuo-rekonstruo: jam la advokato proponis ĝin, por ke la aprezisto taksu la loĝejon pli alte. *Decido: Gabi kaj Amos estas rajtigitaj al la eventualaj luantoj rezigni ĝis du monata lupago (6000 NIS), por plibonigo de la loĝejo laŭ ripar-postuloj (ĉefe kalkado/farbo, kaj etaj riparoj). Aliel: ni faros tion, kondiĉe, ke la luanto petos tiel, kaj pretas atendi dum la ripar-tempo (kun subskribita kontrakto kaj antaŭpago).*

Klimatizilo: duona partopreno de ELI, aŭ nia plena partopreno kontraŭ lupago de 3150 sikloj monate. *Voĉdono: akceptita unuanime.*

*[Intertempe la apartamento estis luigita, kaj riparita por ĉ. 5000 NIS]*

### 4. Financoj (Ŝlomo)

a) Respondo al la registristo (*farita*)

b) Elpreno de la mono el “Menora”: La interezo estas tro malalta, iliaj burokrataj malhelpoj tro altaj. *Decido: Ŝlomo, konsulte kun Eran – estas rajtigitaj serĉi novan lokon por teni nian monon. Voĉdono: unuanime!*

c) Post longaj penoj Ŝlomo sukcesis elpreni 10,000 NIS, kaj pagi kelkajn etajn elspezojn.

ĉ) Kvaronjara raporto disdonita: ne estas rimarkoj.

d) Kompenco de Doron: vidu supre en 2/ĉ. Ni ne povas doni du stipendiojn jare, kaj certe ne salajrojn. Do, laŭ buŝa konsento, alia parto de stipendio trairas al la nova financa jaro.

### 5. Oficejo (Ŝlomo, Amri)

Ŝlomo trovis en str. Bar Kohva, Bnei Brak konstuiĝantan domon de oficejoj, finotan en februaro 2019. Estos 26 oficejoj en unu etaĝo, en diversaj grandecoj, havos komunajn servojn kiel necesejoj, kuirejo, kaj kunsida salono de 33 m<sup>2</sup>. La plej malgranda oficejo, 17 m<sup>2</sup> entute, 10.6 m<sup>2</sup> nete, kostus 299 mil siklojn plus VAI (valu-aldona imposto), entute ĉ. 350 000 NIS. Tre multekosta - sed eblas luigi ĝin por 3000 NIS monate, la luanto pagus la tenokostojn, kaj la posedantoj – ni! – supozeble povus aranĝi foj-foje kunsidojn, eĉ pli, en la komuna kunsid-salono..

3/...



Ni gajnus solvon por kelkaj problemoj! Eran, Gabi: la parkado povas esti granda / multekosta problemo! Aliaj: ni devas esplori la atingeblecon!

*Decido: la oferto estas interesa, Ŝlomo estas petata daŭrigi! Necesas marĉandi kaj esplori pri la lueblecoj!*

b) Principa decido devas esti antaŭ la membraro: ĉu aĉeti aŭ ne - en la Landa Kunveno (ZV).  
*[Intertempe montriĝis ke pluraj kontraŭas aĉeton de oficejo for de Tel-Avivo. Aperis kelkaj ofertoj en Konstruaĵo Klal (strato Drujanov), unu ŝajne taŭga (40m, 700 mil NIS), sed kiam Ŝlomo rekontaktis post unu semajno, ĝi jam ne estis aktuala]*

## 6. Israela E-isto (Mikaelo, Amri)

a) Amri sendis materialon al Mikaelo, inkl. pluraj artikolojn, jam sufiĉe por la venonta n-ro por 16 paĝoj. Li sendos pli! (ne ĉio estas jam finverkita). Mikaelo ankoraŭ atendas de Amri artikolon pri la Itala Kongreso, pri la premioj, kaj fotojn. Celdato: 1/12/2018.

b) N-ro 166 (vintro 2018) - Mikaelo enpaĝigos. Gabi tralegos la tuton en novembro.  
*[Intertempe Amri sendis al Mikaelo la petitan materialon. Fine de Oktobro Mikaelo revenas de Kievo]*

## 7. IK-20 Eilat+Akaba (Amri)

a) Informado: aperu anonco en la novembra n-ro de Esperanto. *Akceptite unuanime.*

b) Reta aliĝilo kaj modifitaj datumoj (Dror, farita – videbla en la reto). Estas jam du pagintaj aliĝintoj (eksterlandanoj).

c) Amri rezervis en "Club-Inn" Eilat 30 4-personajn apartamentojn (po du-du personoj). La prezo estas elstare bona: 500 NIS por du noktoj + matenmanĝo (por unu persono)

ĉ) Propono: resti 3-an nokton ankaŭ sabatvespere, por tiuj, kiuj ne volas veni al Akaba, sed restos en Eilat. Iri al Akaba dimanĉe (14.4) matene.

*Akceptite unuanime.*

d) Artistoj: Kajto povos ludi nur en Eilat. Por Akaba+Eilat Amri demandis al Jomo.

*Voĉdono:* Ĉu inviti ankaŭ Jomo? flugoj de Eŭropo al fluĝaveno Ovda (proksime al Eilat) estas nun tre malmultekostaj. *Akceptite unuanime.*

*[Intertempe Amri korespondis kun Jomo, kaj li akceptis koncerti en Eilat kaj Akaba]*

## 8. Jagil *Ne traktita! (venontfoje)*

Kiel eviti pliajn ciklojn de atakoj kaj damaĝo al ELI? Amri skribis al adv. Modan. Ne venis respondo. Ĉu Eran kontaktis pri tio adv-n Morag?

**La venonta kunsido:** 5-a de Novembro 2018, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi / aldonoj: Amri Wandel